

Ambicia sempatologia verko de P. Neergaard

La mondfama sciencisto, prof. *Dr. Paul Neergaard*, la direktoro de Dana Ŝtata Instituto por Sempatologio, verkis anglalingvan libron *Seed — a horse of hunger or a source of life?* (Semo — ĉu portanto de malsato aŭ fonto de vivo?).

Eldonis ĝin en 1985 *University of Mysore* (Universitato de Majsur, Hindio). La reviziita represaĵo aperis en 1986.

La 174-paĝa verko estas dividita en 6 ĉapitrojn kun abundaj ilustraĵoj (fotoj, mapoj, grafikaĵoj, tabeloj). Fermas ĝin riĉa referenc-listo kaj zorge kompilita indekso.

La sciencan publikon sendube interesos ne sole la sempatologia sed ankaŭ la scienc-komunikada problemaro. Pri tiu ĉi traktas la 6-a ĉapitro: *Language Barriers and Corrosion of Communication in Science* (Lingvobaroj kaj komunika korodado en scienco). Apogante sin sur seriozaj statistikoj, prof. *Neergaard* pravigas la solvon per la neŭtrala lingvo Esperanto.

Ĉiu SR-leganto, kiu deziras interveni ĉe sciencaj institucioj plede por Esperanto, devus detale konatiĝi kun la grava ĉapitro en la libro de prof. *Neergaard*.

J. Kavka

Gerhard Kalckhoff: 80

Kun apartaj estimo kaj dankemo mi venas por memori la SR-legantaron pri la ĉi-jara vivjubileo de nia kara kolego-estrarano.

Dr. Gerhard Kalckhoff naskiĝis la 3-an de aŭgusto 1907. Kiel 17-jarulo li eksciis pri Esperanto kaj aĉetis lernolibron. Ekde 1926 ĝis 1932 li studis fizikon, matematikon kaj filozofion en Universitato de Berlino. La doktorecon de filozofio li akiris per disertaĵo fizika. Poste li laboris dum 40 jaroj ĉe la firmo *Siemens* sur la kampoj de telekomunikado kaj komputado.

Sian veran esperantiĝon li datas ekde 1948, kiam li lernis la lingvon dum 14-taga feriado. En 1951, dum la munĥena Universala Kongreso li havis okazon por ekzerci sin en parolkapablo. Tie li konatiĝis kun *Dipl.-Ing. Rudolf Haferkorn*, tiama delegito de ISAE kaj gvidanto de la germana ISAE-filio. Sekvis longjara korespondado inter ambaŭ kolegoj pri terminologio, precipe de la fako telekomunika. Post kiam d-ro *Kalckhoff* eklaboris en la sekcio por komputado (ĉe *Siemens*), akademiano inĝ. *Haferkorn* stimulis lin al kreado de fakkoncernaj terminoj kaj difinoj. Sur ĉi kampo disvolviĝis fruktodona kunlaboro inter *Kalckhoff* kaj la brita fakulo *Antony C. Pick*, kiu liveris la anglalingvajn terminojn kaj esperantlingvajn difinojn. La komuna ellaboraĵo migris al Terminologia Centro de ISAE, kies direktoro tiam estis akademiano *Ing. Auguste Broise*, la posteulo de *Haferkorn*. *Broise* aldonis la terminojn franclingvajn.

Ekde 1966, *Kalckhoff* estas delegito de ISAE por Federacia Respubliko Germanio kaj gvidanto de la landa ISAE-filio, kiu nun havas 30 membrojn.

Jen mi dediĉu — kadre de la biografio pri *Kalckhoff* — iom abunde da atento al Terminologia Centro de ISAE. Ja okaze de la centjara Esperanto-jubileo denove aktualiĝas urĝeco de la terminologia institucio.

Dum mia funkciado kiel la ĝenerala sekretario de ISAE mi konatiĝis kun la terminologia aktivado de d-ro *Kalckhoff*. Li senlace korespondadis kun multaj fak kolegoj kaj lingvistoj, por atingi unuecon precipe en la terminologio komputada. Tiam, post la forpaso de *Broise*, mia grava zorgo estis trovi taŭgan anstataŭulon en la funkcio TC-direktora. Post vigla leterado kun *Haferkorn*, ni ambaŭ venis al la konkludo, ke la plej taŭga kandidato estu *Rüdiger Eichholz*, loĝanta en Kanado kaj pruvinta — precipe per la fama Bildvortaro — sian kapablon pri organizado de terminologiaj laboroj. Post la koncernaj aproboj fare de l' ISAE-estraro kaj Akademio, mi oficiale nomis lin, komence de 1975, la direktoro de TC kaj samtempe gvidanto de ĝia Registra Departemento. Laŭ lia propono, mi petis akademianon prof. *A.D. Atanasov*, ke li gvidu Arbitracian Departementon de TC-ISAE. Tiu departemento estu institucio por kontrolado de faklingvo; ĝi faru rekomendojn, se fakuloj ne povos akordiĝi pri iu termino; ĝi kondamnu terminon, kiu ne konformos al la fiaraktero de Esperanto kaj kiu ne estas dezirinda por ĝia perspektiva evoluo.

Mi prezentis la peton al *Atanasov* kaj poŝtrevne ricevis lian jesan respondon. Li, la 83-jarulo, komprenis la gravecon de la projekto kaj pretis funkcii, ĝis TC trovos pli junan kompetentulon. Fine restis la tasko, krei la tri departementojn laŭfakajn: Tehnikan, Natursciencan kaj Socisciencan.

La gvidanto de l' unua fariĝis laŭ mia propono d-ro *Kalckhoff*, samtempe akceptante la funkcion de la TC-vidirektoro. La fakto, ke li kaj *Eichholz* estas germanoj, promesis garantii glatan progresadon de la kunlaboro. Per la sukcesa elekto de la tri eminentuloj por TC, granda parto de la zorgoj falis de mia koro. Bedaŭre, la ceteraj departementoj neniam ekfunkciis. D-ro *Kalckhoff* devis plenumi kroman agendon natursciencan eĉ alifakan. Lia tasko estis diskuti kun koncernaj fakuloj pri iliaj terminologiaj proponoj ĝis interkonsento, por ke tiuj ĉi povu esti publikigataj en Slipara Vortaro de *Eichholz*. Ĝis antaŭ nelonge li havis 50 kunlaborantojn el 15 landoj. Danke al lia eksterordinara kapablo taktike trakti kun la fakuloj, sukcese kreiĝis terminaretoj pri teksado, diplomatio kaj internacia juro, solidaĵo-fiziko, kibernetiko kaj heraldiko. Memkomprene, li kunlaboris ankaŭ pri multaj aliaj fakoj. Homo, ne senpere engaĝita en terminologia aktivado, apenaŭ povas imagi, kiom da streĉa laboro devas esti elspezata por atingi unuecon de la faklingvo.

Kompetente li okupis sin ankaŭ pri ellernebleco de lingvoj. Esperanto-resumo de lia germanlingva traktaĵo tekstas jene: "La komparo de la ellernebleco de

lingvoj estas en epoko de pliiĝanta internacia komunikado pli kaj pli gravigenda. Baze de ekzistantaj teoriaj kaj eksperimentaj esploroj pri la atingebla lingvestrado depende de la informenhavo de la lingvo, de la efikanco de la instruado, de la lernrapido kaj de la antaŭscio rezultiĝis, ke la lernadtempoj de la germana/angla, la itala/rusa kaj Esperanto ĉe la sama lingvestrado estas en la raporto de 4:3, 4:1. Kurboj de la kompetencgrado depende de la lernadtempo estas figuritaj por la diversaj lingvoj".

El la funkcioj de d-ro *Kalckhoff* mi ne preterlasu mencii ankoraŭ du: prezidanto de la bavara sekcio de Eŭropa Klubo, gvidanto de laborgrupo pri Nova Vortaro Germana-Esperanto (1981-1984).

En 1985 aperis Baza Komputada Vortaro, kies ĉefaŭtoro estas *G. Kalckhoff* kaj la kunaŭtoroj *A.C. Pick* kaj *A. Broise*. Nia recenzo pri tiu ĉi grava verko troviĝas en SR, 1987, 1(153).

Nuntempe, d-ro *Kalckhoff* helpas pri korektado kaj komplementado de Parolturnaro Germana-Esperanto. Lia nelacigebla diligenteco eĉ en la progresinta aĝo devus esti instiga por la junuloj, kiuj transprenos de ni la terminologian stafeton.

Restas por elkore deziri al nia meritoplana jubileulo bonan sanon; li povu ankoraŭ longe resti aktiva ISAE-ano.

Josef Kavka

Kelkaj verkoj de *G. Kalckhoff*

- 1943: *Über das Ersatzbild einer Brückenschaltung mit nichtidealem Differentialübertrager.* (La kunaŭtoro: *A. Dold*.) — *Telegrafentechnik, Fernsprech- und Fernseh-Technik*, 32, 8.
- 1953: *Über die Hochfrequenzverluste in einer Hochspannungsschaltstation beim Trägerfrequenzfernsprechen auf Hochspannungsleitungen.* — *Frequenz*, 7(1).
- 1954: *Fernschreiben über Hochspannungsleitungen.* — *Elektrotechnische Zeitschrift ETZ*, 75 (A8).
- 1958: *Funktstörungen durch Korona bei 380-kV-Anlagen.* (La kunaŭtoro: *W. Fleischhauer*.) — *Siemens-Zeitschrift*, 32(7).
- 1972: *Führung von Rechenzentren.* (La kunaŭtoroj: *H. Kapp*, *R. Riehn*.) — *Siemens-Schriftenreihe: data praxis*.
- 1974: *Betriebsorganisation von Rechenzentren.* — *Öffentl. Verwaltung und Datenverarbeitung*, 4(6).
- 1979: *Eine vergleichende Darstellung der Erlernbarkeit von Sprachen.* — *Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft*, 19(2). Esperanto-resumo en *Homo kaj Informo*, 1-2, 1979.